

la 18^{an} de Dec. 1930

Kara Amiko

Kelkaj vortoj por al vi sendi miajn plej bonajn bondezirojn por feliĉa Kristnasko + Novjaro. Mia edzo + mi ofte parolas pri vi kiu estas nia amiko de baldaŭ 10 jaroj. Mi bedaŭras ke vi nek havas tempon, nek inklinon skribi, sed tio ne malhelpas la amikecon aŭ la rememorecon ĉu ne?

Kiel ĉiuj fartas ĉe vi? Kaj Eveto? ĉu ŝi konas kelkajn vortojn Esperantajn?

De post mia kuracado en Cauterets, mi ne plu havis malvarmumon k.t.p.

Mia edzo ĉiam laboras. Li estas for nun por 2 tagoj en Apelacia Korto. Hieraŭ, li defendis mortigiston kiu estis kondamnita al 18 monatoj da malliberejo. Li mortigis sin defendante¹ kontraŭ alia.

Dum mi al vi skribas la Radio priskribas la grandan kunvenon en la Parlamento en Parizo. Certe, tiu nova Ministraro falos. Ho! tiu politiko! kiel ĝi malplaĉas al mi. Estas el la stacio "Eiffel tour". Vi ne devas tre bone aŭdi ĝin.

Mi havas tre fervoran korespondanton en Zagreb (estas Polo kiu vidis min antaŭ 18 jaroj en Krakovo) + li estas granda radio-amanto. Lia nomo estas Stanislas Rosenbock, frato de la organizinto de la Krakova Kongreso + kiun vi + mi vidis dum kelkaj minutoj en Wien, kiam mi eksupreniris la tramveturilon antaŭ tagmanĝi kune.

Mi kunsendas kelkajn P.M'jn por Eveto. Eble ŝi ilin jam havas.

Mi finas dezirante al vi multan animan serenecon en 1931. Ne forgesu viajn malnovajn amikojn.

Ĉiam esperante + samideane amike

Acie Sergeant

¹ "... li mortigis defendante sin ..."